

Friedrich Schiller,
Al la ĝojo

tradukita de Kálmán Kalocsay

Ĝoj'! Fajrero belradia!
Elizea di-filin'!
fajrebrie ni al via
templo iras, preĝi vin.
Ĉesu, de vi sorĉligate
de l' rigora mod' la ŝir',
ĉiuj homoj sentas frate,
se vi ŝirmas perflugil'.

Ĥoro:

Jen brakumoj al milmiloj,
Jen ĉi kis' al tuta mond'!
Fratoj! super stela rond'
loĝas patro por ni, filoj!

Se la granda ĵet' bontrafis
kaj amikon gajnis vi,
se virina am' vin ravis:
Vin enmiksi kun ĝojkri'!
Jes, se eĉ nur unu koro
estas via en la mond'!
Kaj se ne – do vin kun ploro
ŝtelu for el nia mond'.

Ĥoro:

Ĉiu sub ĉielo ĝlata
donu sin al simpati',
al la steloj gvidas ĝi,
kie tronas Nekonata.

Ĉiu sur la brust' Natura
suĉas sukcon de la ĝoj'
kor' malbona, koro pura
sekvas ŝin laŭ roza voj'.
Ŝi vinberojn, kisojn donas
kaj amikon sen pridub',
en volupt' la vermo dronas,
vidas Dion la kerub'.

...

Friedrich Schiller,
Al la ĝojo

tradukita de Joachim Gießner

Ĝojo! Vi fajrero dia,
d'Elize' filino vi!
En sankteĵ' benita via
arde vin omaĝas ni.
Sorĉe ligas vi beate,
se disigis malraci'.
Hom' al hom' estiĝas frate,
kie milde regas vi.

.....

.....

.....

.....

.....

Kiu de amik' fidela
nomas sin amik' de li,
kiu kun edzin' anĝela
vivas, jubladu pli,
eĉ, se nur al unu koro
ie ligas lin inklin'.
Sed aliaj ja kun ploro
el la lig' forŝtelu sin.

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

...

Ĥoro:
Ĥu genuas vi, milmiloj?
Vi kreinton sentas, mond'?
Serĉu super stela rond',
logas Li trans astro-briloj!
En eterno de l' Naturo	Ĥojo estas la risorto
Ĥojo estas la risort'.	en eterna la natur'.
En la mondhorlog' por kuro	Ĥojo jen per sia forto
radojn pelas ŝia fort'.	movas l'universon nur.
Ŝi el ĝerموj logas berojn,	Florojn el burĝonoj logas,
sunojn regas ŝia gvid'	sunojn, astrojn puŝas ĝi.
Ŝi tra l' spaco rulas sferojn	Sferojn forajn ĝi apogas
trans la astronoma vid'.	en senfina galaksi'.
Ĥoro:
Kiel sur la pompaj vojoj
sunoj sur la firmament',
gaje marŝu, frata gent',
kiel venki la herooj!
Esploriston ŝi alridas
el la fajrspegul' de l' Ver',
sur krutaj' de l' Virto gvidas
ŝi la homon de toler',
sur Kred-Monto sunobrila
flirtas ŝia flag' el or',
ŝin tra l' fendo ĉerk-kovrila
vidas ni en anĝel-ĥor'.
Ĥoro:
Ho toleron, paciencon,
fratoj, por pli bona mond'!
Donos super stela rond'
granda Dio rekompencan!
Ĥu pripagi diojn? Vanto!
Ĥu simili? Bela pen'!
Venu ĝoji kun ĝojanto
la mizero, la ĉagren'.
Venĝ'? Koler'o? En forgeson!
Jen pardon' al malamik'!
Liaj larmoj havu ĉeson,
lin ne boru pento-pik'.
...	...

Ĥoro:
 En ŝuldlibroj plu nenio!
 Mondon regu harmoni'!
 Fratoj! Kiel juĝis vi,
 tiel juĝos pri vi Dio!

Ĥojo ŝaŭmas en pokaloj,
 en orsango de l' vinber',
 mildon trinkas kanibaloj,
 heroecon malesper'.
 Se rondiras la botelo,
 fratoj, saltu el la sid',
 ŝprucu ŝaŭmo al ĉielo:
 Jen ĉi glas', por Bon-Spirit'!

Ĥoro:
 Himnas Lin abismo stela,
 serafar' kun glora cit'.
 Jen ĉi glas' por Bon-Spirit',
 supre, trans la tend' ĉiela!

En suferoj: firma forto,
 al senhelpaj: ŝirma brust',
 eternec' al ĵura vorto,
 eĉ al malamiko: just'.
 Virfiero kontraŭ tronoj,
 kvankam sangon kostu spit',
 al merito estu kronoj,
 kaj pereoj al insid'!

Ĥoro:
 Fermu vin en sankta rondo,
 Ĵuru do kun glaso-lev',
 pri l' fidelo al la Dev',
 je l' Reganto de l' Stel-Mondo!

*Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de FRIEDRICH SCHILLER (Frederiko Ŝilero, *1759 – †1805) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalamano Kaloĉajo, *1911 – †1976) en 1958.*

Arg-133-263 (2004-01-16 21:13:09)

*Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de FRIEDRICH SCHILLER (Frederiko Ŝilero, *1759 – †1805) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-133-889 (2008-02-27 19:35:47)